I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 11 - 12 Novembro kaj Decembro 1960 10-a Jaro

## NI FUNEBRAS

Profesoro Giorgio CANUTO, forlasis nin por ĉiam je la 29-a de oktobro 1960-a.

Tiu ĉi dato por ni Esperantistoj de la tuta mondo signifas fulmbatan kaj kruelan sciigon, kiu igis nin en la plej grandan ĉagrenon. Ni ne havas taŭgajn vortojn por konvene kaj digne esprimi la sentojn de nia koro. Estas doloro, malespero, korpremo kaj ploro; malfacile estas kaj peza tasko paroli pri LI, ĉar ni ne povas digne priskribi kiel ni volus pri Lia vivo.

Profesoro Canuto, Direktoro de Jur-Medicina Instituto ĉe la Universitato en Torino je la 13-a horo en strato "Stati Uniti" 35, kie Li loĝis kun la edzino Maria Franco kaj la filo Pietro, 21-jaraĝa medicinstudento, mortis pro gravega koraktakso. Jen la subita kaj terura sciigo.

Li naskiĝis en Torino la 3-an de junio 1897-a; ankaŭ la gepatroj estis ambaŭ kuracistoj kaj la patrino estis la unua virino kiu atingis medicinan doktorecon en Italujo ĉe la Universitato de Torino.

Dum 6 jaroj Li estis Rektoro de la Universitato en Parma, poste je la jaro 1956 Li estis invitita en Torino ĉe la Universitato kiel Direktoro de la Jur-Medicina Instituto.

Lia aktiveco pri Arto, Kulturo kaj Scienco estas granda kaj nobla ekzemplo: Li ĉiam montris al ni Esperantistoj la ĝustan vojon konvinke kaj taŭge.

Neniu povos forgesi Liajn paroladojn pri Esperanto ĉar Lia koro ĉiam estis honesta, malavara, modesta, homa, komplezema; ĉiam preta por helpo kaj konsiloj.

Estas granda perdo por la nuna Scienco, sed precipe por ni Esperantistoj ĉar ni jam perdis unu el la plej gravaj apostoloj de nia movado, ne nur nacia sed ankaŭ tutmonda.

Al la ĝentila edzino kaj filo de nia amata profesoro ni esprimas nian sinceran kondolencon.

GIUSEPPE ZACCONI

## BONDEZIROJ

OKAZE DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, LA ESTRARO DE ITALA ESPERANTO-ASOCIO DE FERVOJISTOJ KAJ LA REDAKCIO DE "INFORMA BULTENO", FRATE BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO.

NI SENDAS KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

## DEZIRAS KORESPONDI

- Nina MEDEMOVA, Str. "L. Karavelov", 34 - GABROVO (Bulgario)
- Esperanta fervojista grupo (40 junuloj kaj 10 plenaĝuloj) deziras korespondi kun gelernantoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Ni nepre respondos dum marto 1961. Adreso: Esperanta GRUPO S.N.C.F. 1 rue de Paris. ST.ETIENNE DU ROUVRAY (Seine Maritime) Francujo.
- Aro de Hungaraj knabinoj 12 ĝis 14 jaraĝaj, kiu lernas Esperanton kaj loĝas en la edukinstituto de Hungaraj Ŝtataj Fervojoj, deziras korespondi kaj interamikiĝi kun eksterlandanoj por ekzerci la internacian lingvon kaj por havi amikojn en la granda mondo. Adreso: Fervojista Junulara Esperanto-Rondo, KAPOSVAR MAV Nevelőintézet (Hungario)

## CEREMONIO HONORE AL ZAMENHOF EN ROMA KAPITOLIO

En la kadro de la manifestacioj, por memorigi la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, sub la alta protektado de UNESCO, ĵaŭdon la 24-an de novembro okazis, en Romo, en la historia salono "Protomoteca" de la "Campidoglio", solena ceremonio; organizita de la Internacia Komitato pri Unueco kaj Universaleco de la Kulturo. Kunlaboris la agema loka esperanta grupo kaj oficiale prelegis Prof. Agostini, membro de F.E.I.

Tiuj kiuj feliĉe povis ĉeesti tiun kortuŝan manifestacion povas certigi ke ĝi estis impona kaj bonsukcesa. La mondfama loko, la historia salono, la multnombra aŭskultantaro, kaj precipe la ĉeesto de gravaj aŭtoritatuloj donis al ĝi specialan soleneco n. Fakte altaj personecoj de la Kulturo, politiko, kaj diplomatio, inter kiuj oni rimarkis la Ambasadoroj de Anglujo, Polujo, Kolumbio, kaj Peruo.

Antaŭ elekta kaj multnombra publiko, malfermis la ceremonion la reprezentanto de la Roma komunumo, Sig. D-ro Ugo D'Andrea, kiu portis la saluton de la Urbestro, sekvis poste la konciza sed varma parolado de la Angla Ambasadoro Sir Aschley Clarke, kiu estas la internacia prezidanto de la iniciatinta Komitato, kiu, itale, klarigis la signifon de la manifestacio, kaj montris sian solidarecon kun la esperantistoj de la tuta mondo kun ferma konvinko en la venko de Esperanto.

La Ĝenerala Sekretario de tiu Komitato pri Unueco kaj Universaleco de la Kulturo, la poeto On. Coserschi en sia longa kaj varma prelego anoncis, inter la plej vivaj aplaŭdoj de la ĉeestantoj, la decidon formi (inter la Komitato mem) Komisionon por la studado kaj la disvastigo de Esperanto. Honora Prezidanto de tiu Komisiono estis elektita la 80 jara pioniro de Esperanto: Lia Ekcelenca Moŝto Advokato Bagnulo el Bologna.

Fine, komenciĝis kaj disvolviĝis la festparolado de Prof. Agostini, kiu post mallonga priskribo pri la vivo de Zamenhof plilonge kaj detale pritraktis lian genian agadon kaj verkon, nome kreadon de internacia lingvo Esperanto. Rimarkigis kaj evidentigis ĝian strukturon, ĝian utilecon, kiel ilo de interkomprenc kaj frateco, kaj precipe ĝian universalecon.

Multaj esperantistoj fermis la festotagon per riĉa vespermanĝo en la apuda karakteriza restoracio "La Catena" kie je la fino, dum la trinkado de ŝauma vino, oni aŭdis ankoraŭ la varmegajn vortojn de S-ro Grafo Fontanive (aktuala prezidanto de la nova Roma grupo kaj honora membro de I.F.E.A.) kaj de On. Coselschi kiu kortuŝis ĉiujn per siaj entuziasmaj vortoj.

Al ambaŭ iniciatintoj de tiu bela kaj bonsukcesa manifestacio niaj plej korajn dankojn, kaj ankaŭ al niaj Bolonjaj estroj Prof. Agostini kaj Adv. Bagnulo kiuj neniam ĉesis ilian laboron kaj penadon favore al Esperanto.

GIUSEPPINA BILLI GAMBERINI

## C O M U N I C A T O

Col X° Congresso Nazionale della "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" tenutosi il 12 settembre 1960 a Cortina D'Ampezzo nel quadro del 31° Congresso Italiano di Esperanto, si è aperto il nuovo anno finanziario 1960-61.

Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al più presto. Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega al presente bollettino, il bollettino di versamento nel Conto Corrente Postale n° 8/24094 intestato alla "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" Via Donato Creti, 61 - Bologna (131).

Si rammenta che le quote sociali per il 1961 sono:

- Associazione alla I.F.E.A., alla I.F.E.F., alla U.E.A. ed alla F.E.I., con abbonamento alla rivista "L'Esperanto": £. 1200,- annue.
- Associazione solamente alla I.F.E.A. ed alla I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla F.E.I. ed alla U.E.A. direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 600,- annue.

Si pregano vivamente i soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per il 1960, e che continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote per l'anno 1960 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti (U.E.A., I.F.E.F. e F.E.I.) oppure trasmettere le loro dimissioni per non dovere pagare le loro quote anche per l'anno 1961 alle suddette Associazioni.

## LA 13-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

BARCELONO, Hispanio, 6 ĝis 11 majo 1960

Adreso: 13-a I.F.E.F.-kongreso, Estaciòn Termino, R.E.N.F.E. Barcelono (Hispanio)
Kongresejo: Casino del Parque de la Ciutadela - Bankkonto: 13-a Fervojista Internacia Kongreso de Esperanto, Banco Exterior de Espana, Barcelono (Hispanio)
Protektata de la Sindikata Fako "Educaciòn y Descanso"

HONORA KOMITATO

S-ro José Solis Ruiz, Ministro Ĝenerala-Sekretario de la Movado; S-ro Agustin Plana Sancho, Prezidanto de la Fervoja Administracia Konsilantaro; S-ro Felipe Acedo Colunga, Provincestro de Barcelono: S-ro José Ma de Porcioles, Urbestro de Barcelono; S-ro Joaquin Bouxò de Albaigar, Prezidanto de la Provinca Deputitaro; Generalo Angel Gonzales de Mendoza, Komandanto de la urba garnizono; S-ro Juan Estevez, Polica supera ĉefo; S-ro Vicente Garcia Ribes, ĉefo de la Transporta Sindikato; S-ro José Ma Perxes, Direktoro de la 5-a Terzono de R.E.N.F.E.; S-ro José Ma Gutierrez del Castillo, Nacia ĉefo de la Sindikata Fako "Educaciòn y Descanso"; S-ro Salvador Montagut Cuadrat, Inĝ. Dip. Ĉefo de la Inspektora Divizo de R.E.N.F.E.; S-ro Manuel Alonso Gonzalo, Ĉefa Poŝtadministranto de Barcelono; S-ro Gonzalo Turull Moragas, Direktoro de la Kataluna Fervoja Kompanio; S-ro Manuel Sancho Vecino, Provinca ĉefo de Sindikata Fako "Educaciòn y Descanso".

KONGRESA PROGRAMO

Sabate 6.V 9 h. Malfermo de la akceptejo kaj kongresejo
17 h. Kunveno de la L.K.K. kaj de la I.F.E.F.-estraro
18 h. Terminara kunsido 21 h. Interfratiĝa vespero.
Dimanĉe 7.V 11 h. Solena malfermo. Vizito al Gotika Kvartalo kaj komuna fotografado.
Posttagmeze libera. Eble estas kongresanoj kiuj deziras ĉeesti Taŭran Feston.
21,30 h. Vizito al la grandaj lumfontoj ĉe la Montjuich Parko kaj Folklora Festo en Hispana Vilaĝo en la sama parko.
Lunde 8.V 10 h. Fakprelego, Poste kunveno de la fakprelega komitato
15,30 h. Redaktora kunveno. 17 h. Estrara kaj delegitara kunveno
21,30 h. Amuza vespero. Filmprezentado.
Marde 9.V 10 h. Unua laborkunsido. 16 h. Rondveturado. 22 h. Internacia balo.
Merkrede 10.V 10 h. Dua laborkunsido. 16 h. Vizito al fabrikoj kaj riparejoj
22 h. Koncerto aŭ teatraĵo.
Ĵaŭde 11.V 8 h. Tuttaga ekskurso al Tarragona. Revenante ni haltos en Villafranca: vizito al la vin-muzeo, lunĉo kaj folklora vespero. Fermo de la kongreso.
Vendrede 12.V Matene eventuala ekskurso aŭ vizito.
21 h. Enŝipiĝo de la kongresanoj kiuj vizitos Mallorca.

ĜENERALAJ INFORMOJ

Kongreskotizo: Kongresano: Antaŭ la 15-a de februaro 200 pesetoj, poste 240 pesetoj
Familiano: Antaŭ la 15-a de februaro 130 p. poste 145 p. Pensiulo: Same. Simpatianto 60 p.
Ekskursoj: La kotizo por la tuttaga ekskurso estas 175 pesetoj. Ĝi inkluzivas lunĉon, aŭtobuson, tagmanĝon kaj lunĉon en Vilafranca del Panades kie ni haltos por viziti la Vin-muzeo. La tiu-urba esperantistaro aranĝos amuzan kaj folkloran vesperon.
Kiel pagi? La aliĝilo validas nur kun samtempa pago. Sendu rekte la kotizon al la bankkonto de L.K.K. Se iu kongresano havas malfacilaĵojn, oni pagu al la landa peranto.
Korespondado: L.K.K. respondas nur esperantlingve.
Prezoj de la Ŝipveturado Barcelono-Palma de Mallorca: 1-a Klasa (kun lito) 398 pes. Turista klaso A (kajuto 2 litoj) 277 pes. Turista klaso A (kajuto 4 litoj) 242 pes. Turista klaso B (kajuto 2 litoj) 205 pes. Turista klaso B (kajuto 4 litoj) 170 pes. Turista klaso B (speciala seĝo) 140 pes. Ferdeko 102 pes. Flugmaŝino: 340 pes. Vojaĝdaŭro 40 minutoj.

PROVIZORA PROGRAMO DE LA POSTKONGRESA VIZITO AL MALLORCA

Vendrede 12.V: Enŝipiĝo. Sabate 13.V: Matene je la 7-a horo alveno al Palma. Posttagmeze vizito aŭtobuse al Kastelo kaj Arbaro Belver. Interfratiĝa vespero.
Dimanĉe 14.V: Matene Sankta Meso, fotografado, vizito al la urbocentro, malferma kunsido. Posttagmeze libera. Lunde 15.V: Ekskurso al Pollensa (tra Alcudia). Inca. Kabo Formentor. Reveno vespere. Marde 16.V: Ekskurso al Monacor. Vizito al la grotoj de Drach kaj Porto-Cristo. Je la 21-a h. enŝipiĝo por reveturi al Barcelono.
Se estas IFEF-anoj, kiu deziras resti en Palma dum la tuta H.E.F.A.-kongreso, la programo estas: 17.V: ekskurso al Valldemosa, Miramar, Dey kaj Soller. En Soller oni celebros fol-

kloran feston. 18.V: vizito al Cap de Mar, Andraitx, S'Arraco, San Telmo. 19.V: solena fermo de la kongreso. Bankedo.
Prezoj de la hoteloj en Palma: Hotelo 1-a kl.A: 230-260 pes.; 1-a kl.B: 175-210 pes.; 2-a kl.: 145-170 pes.; 3-a kl.: 13P-145 pes. Ĉiuj prezoj estas po persono kaj po tago kaj inkluzivas tri manĝojn kaj la servmonon. Pensiono: 95-145 pes.
INFORMAZIONI PER GLI ITALIANI: Tutti coloro che intendono intervenire al Congresso di Barcellona possono inviare la loro adesione, accompagnata dal relativo importo al Segretario Gimelli Germano, Via Donato Creti, 61 Bologna (C.C.P. n° 8/24094) che si è assunto le funzioni di "landa peranto" per gli italiani.

Le quote di adesione al Congresso in ragione di £.11,50 per ogni pesetas, salvo conguaglio se vi sarà sensibile differenza, sono stabilite, fino al 15 febbraio 1961, in pesetas 200 (£. 2300) per il Congressista, in pesetas 130 (£. 1500) per familiari e pensionati. Oltre alla quota di adesione dovrà essere pure inviata la quota per la prenotazione dell'alloggio di pesetas 100 (£. 1150). La quota per la escursione a Tarragona e Villafranca è stabilita in pesetas 175 (£. 2020) comprensivo dei tre pasti, autobus, visita al museo del vino ecc. Attenzione che il limite di tempo per l'accettazione delle adesioni è il 1° Aprile 1961. Si raccomanda la massima precisione nella compilazione dell'"aliĝilo".

## 46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

5 - 12 aŭgusto 1961 en HARROGATE, Britujo, Sub la alta protektado de Lord BOYD ORR, Nobelpacpremiito. Poŝtadreso: 46-a Universala Kongreso de Esperanto Harrogate (Britujo). Telegramadreso: Esperanto, Harrogate. Banko: Midlald Bank Ltd., Harrogate.
Kotizoj: Ĝis la fino de decembro 1960 validas la jenaj kotizoj: Kongresano 75 britaj ŝilingoj, edzino la duono, gejunuloj ĝis 20 jaroj kaj studentoj 25 ŝil. Plenaĝaj aliĝantoj, kiuj estas individuaj membroj de UEA, havas rajton al rabato de 8 ŝil. edzino de individua membro al rabato de 4 ŝil. Post decembro 1960 la kotizoj plialtiĝos.
Unua Bulteno: La unua Oficiala Bulteno de la Kongreso, 8-paĝa kaj riĉe ilustrita, entenanta plurajn detalojn kaj la provizoran programon de la Kongreso, estas ricevebla ĉe la landaj Esperanto-asocioj, ĉe UEA aŭ ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.
Seminario "Oriento-Okcidento": De la 2-a ĝis 4-a de aŭgusto 1961 okazos en Londono seminario "Oriento-Okcidento" sub la aŭspicioj de UEA. La manifestacioj enhavos prelegojn de eminentaj esperantistoj, prelegojn de britaj orientalistoj, muzikojn, filmojn, poezio kaj dancojn pri oriento.
17-a T.E.J.O.-Kongreso: Ĝi okazos en la universitata urbo Cambridge, unu semajnon antaŭ la Universala Kongreso.

G.C.Fighiera- Konstanta Kongresa Sekretario

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italia)
La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.). -Ondlongoj: metroj 30,90 =Mc/s9,71; metroj 41,24 = Mc/s 7,27 kaj metroj 50,34 = Mc/s 5,96.
Prelegantoj: mardo: alterne S-ro L. Minnaja kaj Prof. D-ro V. Musella
merkredo: S-ro Luigi Minnaja kaj vendredo: Prof. D-ro Vincenzo Musella.
DISSENDOJ EN ESPERANTO - JARO 1961 - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.
JANUARO 1961-a. - mardon la 3-an: Tra la literaturo - vendredon la 6-an: La universala blindultago - mardon la 10-an: Italaj komponistoj: G.B.Pergolesi - vendredon la 13-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 17-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 20-an: Romaj bazilikoj: S. Agnesa ekster la Muroj - mardon la 24-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 27-an: La itala Roloviĝo kaj Giuseppe Verdi -

La Fakestro: L. MINNAJA